Malkovru viajn antaŭjuĝojn

85a GEK
Essen
08.-12.05.2008

Por ĉiuj, kiuj ŝatas **inteligentajn diskutadojn**

La aranĝo do estas por ĉiuj, kiuj ŝatas, iam kaj iam, prelegojn, inteligentajn diskutadojn kaj interparoladojn kun ĉiuaĝaj homoj, pli aŭ malpli famaj.

„Malkovru viajn antaŭjuĝojn'' – Tio estas la titolo de la 85a Germana Esperanto-Kongreso en Essen. Tiu titolo bone taŭgas por kongreso en Essen, ĉar la bildo pri tiu urbo estas forte ligita kun la antaŭjuĝoj pri la regiono Ruhrgebiet: Essen estas en la mezo de la Ruhrregiono, plena de nigraj turoj kaj malpura laboro. Sed ne nur. Essen intertempe ankaŭ havas tre verdajn kvartalojn, tre vizitindajn vidindaĵojn kaj tre multajn lokojn por ripozi.

Essen estis mineja urbo dum kelkaj jardekoj, multaj konstruaĵoj pruvas tiun nigran historion. En la ora tempo de la karbo Essen jam estis internacia urbo. Multe da viroj venis el diversaj orient- kaj sudeŭropaj landoj por trovi laboron en la regiono, iliaj familianoj venis poste por krei familian vivon en la nova hejmo. Pli kaj pli la minado ne plu estis profitdona, ĝi same kiel la fera industrio perdis sian gravecon, la homoj perdis siajn laborpostenojn aŭ se eble pli kaj pli ŝanĝis al oficejaj laborlokoj.

Hodiaŭ Essen estas urbo de multaj grandaj oficejaj turoj. Bankoj, grandaj firmaoj kaj meze en ĝi la turo de la urbodomo influas la urbocentron de Essen. Multaj homoj el la ĉirkaŭa regiono venas ĉiumatene al la urbo por labori ĉi tie. Tamen Essen konservis la vizaĝon de la laboro, en la urbopartoj ofte troviĝas etaj ministaj loĝodomoj. Ankaŭ krom tio Essen estas tre diverseca urbo: Tri grandaj teatroj kaj koncertejoj troviĝas en la urbomezo, diversaj etaj krome. La fama kinejo Lichtburg estas konata el la televido.

Essen havas grandan piediran zonon por ĉies gusto kaj nun konstruiĝas granda nova aĉetumtemplo en la urbomezo.

Ankaŭ religie Essen montras sian diversecon. Apud la ĉefa katolika katedralo troviĝas la sinagogo. Ankaŭ moskeo troviĝas en la norda parto. En la nuna tempo la diversnaciaj laboristoj de la tiama industria tempo kaj iliaj idoj influas la multkulturan vivmanieron de Essen. En la urbo troviĝas multaj etaj budoj kun tradiciaj manĝajoj, vestaĵoj kaj ornamaĵoj de la diversaj kulturcirkloj.

La Germana Esperanto-Kongreso prezentas diversajn interesajn temojn, pritraktatajn per prelegoj kaj diskutrondoj kaj spertindan vesperan programon. Venu kaj aŭskultu la prelegojn de gravuloj de la germana kaj internacia Esperanto-movadoj kaj ĝuu koncertojn.

Andreas Diemel

Plene Provizora Programo

Jaŭdon 08.05.2008
19.00 gvidadeto tra la urbocentro (por frualvenintoj)

Vendredon 09.05.2008
14.00 Akceptejo malfermita
15.30 Frualvenintoj: Promenado
19.00 Solena Malfermo
20.00 Interrekona babilado

Sabaton 10.05.2008
09.30 Festprelego
12.30 Tagmanĝo (inkl. en la kotizo)
13.30/14.30/15.30 Prelego
Fakaj kunvenoj
16.30 Diservo
18.00 Vespermanĝo laŭ propra elekto
20.00 Vespera Programo

Dimanĉon 11.05.2008
10.00 Jarkunveno de GEA
10.00 Turisma alternativo por gastoj, kiuj ne vizitas la GEA-jarkunvenon
12.30 Tagmanĝo (inkl. en la kotizo)
13.30 Ekskursoj (inkl. en la kotizo)
18.30 Vespermanĝo laŭ propra elekto
20.00 Vespera Programo

Lundon 12.05.2008
09.30/10.30 Prelego
Fakaj kunvenoj
10.30 Baza diskuto pri agado de GEA / GEK
11.30 Solena Fermo
12.30 Komuna adiaŭa tagmanĝo (inkl. en la kotizo)

Ekskursoj

Lago Baldeneysee
Unu loko por ripozi en la granda kaj moviĝema urbo estas la lago Baldeneysee en la suda parto de Essen. Tien iros nia unua ekskurso. La lago Baldeneysee estas okulfrapa ekzemplo de la multaj agrablaj anguloj de la urbo. Tuj apude kaj kun rigardo lagen staras la vilao Hügel, la iama rezidejo de la fama industria familio Krupp.

Minejo Zollverein
La dua ekskurso montros la plej nigran kaj plej „malpuran“ angulon de Essen: la minejon Zollverein. Ĝi estis laborejo por miloj da ministoj en la mezo de la pasinta jarcento. Intertempe ĝi fariĝis mondheredaĵo kaj estas alloga vidindaĵo por ĉiuj Essen-turistoj. Multe da kulturaj kaj sociaj aranĝoj okazas tie. (Pro la longaj ŝtuparoj partoprenu nur homoj, kiuj ne estas ege handikapitaj.)

Haveno de Duisburg
La celo de la tria ekskurso estos la granda haveno de Duisburg. Ĝi estas la plej granda interna haveno en Eŭropo kaj transŝarĝejo por iu ajn varo dum ĝia transporto tra la mondo.

Kongresejo
La kongreso okazos en la domo de CVJM en Essen. La adreso estas: CVJM Essen e.V., Hindenburgstr. 57, 45127 Essen, www.cvjmessen.de

Aliĝo
Aliĝilo por la 85a GEK en Essen troviĝas je paĝo 2. La limdato por aliĝo je pli malalta kotizo estas la 10a de januaro 2008.